La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

Historio de CED

CED fondiĝis en la jaro 1952, kiel fako de Universala Esperanto-Asocio gvidata de Ivo Lapenna, por antaŭenigi la sciencan studon de Esperanto “kaj ties diversaj aplikoj en ĉiuj vivosferoj”; por certigi la kompiladon kaj redaktadon de fidinda dokumentado pri Esperanto, kaj por subteni klopodojn prezenti la faktojn pri Esperanto al internaciaj organizoj, al sciencaj kaj fakaj asocioj, kaj al la publiko.

En la 60-aj jaroj, tiuj esploroj pri Esperanto plivastiĝis al la tereno de internacia lingvopolitiko kaj lingvoplanado. Sub la egido de CED, en 1969 fondiĝis la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, ekde 1980 renomita *Language Problems and Language Planning* (LPLP), de jardekoj unu el la plej konataj fakaj revuoj sur tiu kampo.

Meze de la 70-aj jaroj, CED trairis organizan reformon kiu enkondukis plurajn novajn agadojn, unue sub la gvido de Jonathan Pool (1974-80), kaj dum multaj jaroj ekde 1980 kun Humphrey Tonkin kiel direktoro. En 1974 komencis aperi Novaĵletero por Interlingvistoj sub redakto de Ulrich Lins, kiel klopodo kunigi kaj kunlaborigi la fakulojn pri interlingvistiko kaj esperantologio, kaj en 1977 komenciĝis la tradicio okazigi Esperantologian Konferencon kadre de la ĉiujara Universala Kongreso. La bulteno transformiĝis en *Informilo por Interlingvistoj* (IpI) ekde 1983, sub redakto de Ryszard Rokicki; sekvis la longa redaktoperiodo de Detlev Blanke (1992-2015); nun ĝin prizorgas Angela Tellier.

En 1996 Mark Fettes, tiam Ĝenerala Sekretario de UEA, organizis la unuan Nitobe-simpozion kunlige kun la Universala Kongreso en Prago. Tio montriĝis sukcesa provo stimuli dialogon kaj kunlaboron pri lingvopolitiko inter esperantistoj, esploristoj, ŝtatoficistoj, politikistoj, kaj lingvo-aktivuloj, kaj sekvis pliaj simpozioj en la jaroj 1999 (Berlino), 2004 (Pekino), 2005 (Vilno), 2007 (Tokio), 2013 (Rejkjaviko), kaj 2018 (Lisbono) fokusitaj al diversaj aspektoj de la nuntempa internacia lingvopolitiko.

En 1999, Christer Kiselman lanĉis la revuon *Esperantologio/Esperanto Studies* (EES) kiel posteulon de la revuo *Esperantologio*, redaktita de Paul Neergaard de 1949 ĝis 1961. EES aperis en ok numeroj ĝis 2018. Temas pri kolektoj de originalaj studoj pri la lingvaj, historiaj, literaturaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto, kaj ankaŭ recenzoj. Nun sub la redaktado de Guilherme Fians kaj Humphrey Tonkin, la serio daŭros sub la ŝildo de CED.

En 2006, la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation, sub prezido de Tonkin, starigis kunlabore kun CED programon de malgrandaj subvencioj (ĝis USD 2000) por esplora kaj eldona agado rilate al esperantologio kaj interlingvistiko. La subvenciojn aljuĝas internacia tripersona komisiono.

En 2020, okazis organiza reformo de CED, kun la difino de la kvin ĉefaj agadkampoj kaj la starigo de multpersona Konsilantaro nomumita de la Estraro de UEA, inter kies anoj la nova direktoro, Mark Fettes, varbis malgrandan estraron.